

3-a ORDINARA DIMANĈO – 24-an de januaro 2016

***HODIAŬ TIU SKRIBO PLENUMIĜAS EN VIAJ ORELOJ* - Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Luko 1, 1-4; 4, 14-21

Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni, kiel ilin transdonis al ni tiuj, kiuj ekde la komenco vidis mem kaj estis administrantoj de la vorto, tial ankaŭ mi, esplorinte ĉion atente ekde la komenco, decidis skribi en ordo al vi, eminenta Teofilo, por ke vi povu havi certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas instruita.

En tiu tempo revenis Jesuo, kun la potenco de la Spirito, en Galileon, kaj ekestis famo pri Li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. Li instruadis en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj.

Li iris al Nazareto, kie Li estis edukita, kaj, laŭ Sia kutimo, eniris la sinagogon en la sabata tago kaj Li stariĝis por legi. Estis donita al Li la libro de profeto Jesaja. Malferminte la libron, Li trovis la lokon, kie estas skribite:

**“La Spirito de la Sinjoro estas sur Mi,
ĉar Li min sanktoleis
por bonanonci al malriĉuloj, Li sendis min
por anonci liberecon al kaptitoj
kaj vidpovon al blinduloj;
por meti la subprematojn en liberecon,
por proklami favorjaron de la Sinjoro”.**

Kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, Li sidiĝis. La okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente Lin rigardis. Kaj Li ekparolis al ili: “Hodiaŭ tiu Skribo plenumiĝas en viaj oreloj”.

La liturgio de tiu ĉi dimanĉo prezentas al ni la komencon de la evangelio de Luko, kaj tuj poste la unuan predikon de Jesuo en sia vilaĝo, Nazareto, kiu estis vera fiasko. Ni sekvu la tekston de la evangeliisto.

“Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni, ... kiel ilin transdonis al ni tiuj,...” (fakte Luko ĉerpas preskaŭ du trionojn de la evangelio de Marko kaj ilin metas en sian verkon). *kiuj ekde la komenco vidis mem kaj estis administrantoj* (laŭlitere “servantoj”) *de la vorto, (do la kredantoj, la vidatestantoj, servas la vorton, ne estas ĝiaj mastroj; ilia tasko estas diskonigi la vorton por ke ĝi atingu ĉiujn), ...tial ankaŭ mi, esplorinte ĉion atente ekde la komenco, decidis skribi en ordo al vi, eminenta...* (vorto uzata por gravaj personoj, en la libro “Agoj” por romiaj guberniestroj...) *Teofilo, (Teofilo, en greka lingvo “amanta Dion” aŭ “amata de Dio, laŭ lastatempaj esploroj estis la tria filo de ĉefpastro Anna kaj bofrato de Kajafas; ankaŭ li estis ĉefpastro, de jaro 37 al jaro 41; do lia familio ludis gravan rolon en la vivo de Jesuo) ...por ke vi povu havi certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas instruita”*. La lastatempaj esploroj konfirmas, ke Luko aspektas kiel rabeno, do klerulo bone konanta la tradiciojn kaj la historion de sia popolo.

Do Luko asertas, ke tiu ĉefpastro rekonis Jesuon kiel sian mesion, kaj volas certigi lin pri la origino de Lia mesaĝo.

Kaj de ĉi tie la liturgio nin kondukas rekte al ĉapitro 4.

“[En tiu tempo] revenis Jesuo, , kun la potenco de la Spirito, en Galileon..., (Galileo estis regiono malestimata, forgesita de Dio: ĉefpastroj kaj fariseoj mokis: “Neniam el Galileo venis profeto” Joh 7, 53). “...,,...kaj ekestis famo pri Li tra la tuta ĉirkaŭaĵo Li instruadis en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj”. Neniam Luko asertas, ke Jesuo eniris sinagogon por kulto. Jesuo vizitas sinagogojn por instrui sian mesaĝon, por liberigi de la instruado de la skribistoj.

Kompreneble tio estis kaŭzo de incidentoj. Kiam unuafoje Jesuo eniras sinagogon, la situacio estas konflikta.

“Li iris al Nazareto, kie Li estis edukita, kaj, laŭ Sia kutimo, eniris la sinagogon en la sabata tago kaj stariĝis por legi. En la sinagoga liturgio estis (kiel nun ĉe ni) trijara ciklo de legado. Oni komencis per psalmo, psalmo 92, poste oni legis tekstojn el la Leĝo, el la Readmono, kaj je la fino estis la salutlego, teksto de profeto.

"*Estis donita al Li la libro de profeto Jesaja*. Tiun sabaton estis la vico de tiu profeto, sed Jesuo komencis per malobeo. Skribas Luko: "*Malferminte la libron, Li trovis...*, kio tamen pli precize signifas *Li serĉis...*": *la verbo estas eŭrisko*, de kiu venas la fama ekkrio de Arkimedo, konata de ni ĉiuj, *Eŭreka*, "mi trovis", sed mi trovis kion mi serĉis. Konklude, Jesuo ne akceptas la liturgian tekston metitan antaŭ Liajn okulojn, sed serĉas alian en la sama libro. Kiun? La strofon pri la konsekro de la mesio, "*...la lokon, kie estas skribite: „...La Spirito de la Sinjoro estas sur mi...* (Is. 61, 1-2). En la juda liturgio la tekstoj estis legataj en la sankta lingvo, la hebrea, sed, ĉar la popolo ne plu komprenis tiun lingvon sanktan, iu tradukisto tradukis la versiklojn, unu post la alia.

La sekvo estas "*..., ĉar Li min sanktoleis...*: la sanktoleado estis la ŝmirado per sankta oleo, en hebrea lingvo *messiah*, de kiu originas la vorto *mesio*, la konsekro de Dio per oleo) "*...por bonanonci al malriĉuloj...*, Kio estas la bona anonco atendata de la malriĉuloj? La fino de la malriĉeco. Kaj tiu estos la celo de Jesuo: kreo de malsama socio, en kiu la personoj ne amasigas por si, sed kunpartigas kun la aliaj.

Kaj plue "*...Li sendis min por anonci liberecon al malliberuloj kaj vidpovon al blinduloj...*; la blinduloj estis la malliberuloj tenataj en grotoj."

... por meti la subprematojn en liberecon, por proklami favorjaron de la Sinjoro... La favorjaro estis la jubileo, en kiu ĉiuj loĝantoj estos liberigitaj. Kaj je ĉi tiu punkto Jesuo interrompas la legadon, kiun oni ne rajtis interrompi: la fino de la versiklo estis tio, kion la popolo sopiris: *la venĝotagon de nia Dio*" .

Tion postulis la popolo. Sed Jesuo ne konsentas kun Jesaja. Ĉe Dio estas nur vorto de amo, de graco, ne de venĝo.

Skribas Luko: "*Kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, Li sidiĝis*". La legado estas finita. "*La okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente Lin rigardis*". La streĉo atingas la maksimumon.

Nu, Jesuo komencas per frazo, kiu kaŭzos kolereksplodon. Oni klopodos Lin mortigi.

"*Li ekparolis al ili: "Hodiaŭ tiu Skribo plenumiĝas en viaj oreloj"*. Li preparas la rifuzon: la oreloj resendatas al profetaĵo de Ezekielo (Ez 12,1): "*Homido, vi loĝas inter ribeluloj, kies okuloj ne vidas kaj kies oreloj ne*

aŭdas, ĉar ili apartenas al raso de ribeluloj". La rifuzon ni vidos la venontan fojon.